

Ora Ĵurnalo

Numero 12, Novembro 2018



Al la tuta mondo:

Bonvenon al la verda Gotenburgo!

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Dialogo kun Domo, Raita Pyhylä	15
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Lahtio ĝoje invitas esperantistojn al la 104-a Universala Kongreso de Esperanto!.....	17
Espe-Porko meditas	3	Paroĥa kunsido antaŭ 100 jaroj en Stora Lundby.....	18
”Stadsteatern”	3	Promeno kun pli ol 50 birdobservantoj.....	20
Letero de Pollando	4	Muta cigno	20
Ankaŭ Zamenhof iam estis komencanto, Renato Corsetti	5	H C Andersen – la reĝo de la belaj fabeloj!..	21
La ŝtona urbo – romano, kiun vi nepre legu!.	6	Trezorkesto por la radianta lingvo.....	21
Polmo de Wisława Szymborska	7	Pjotr Ĉajkovskij – la sentema, rusa komponisto	22
UN-koncerto en la preĝejo de Angered	8	”Cignolago” – drameca baletoj.....	22
Nekutima vizito ĉe la trejnpado	8	Memoroj de tre interesa studsezono en Karlskoga kun Lars Forsman kiel instruisto..	23
La samea kabano el torfo apud Trollsjön.....	9	Dubrovnik Aŭgusto 2018, Kerstin Rohdin ..	24
El la albumo de Ingegerd – bildoj de Pollando	10	Silenta minuto 11 novembro je 11 horo.....	28
Wisława Szymborska: ”Parabolo”, Ĉenoj.....	13		
Göteborgs-Posten: Bonvenon al la verda Gotenburgo!.....	14		



Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadvägen 68. La eldonfrekvenco estas neregula.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



Espe-Porko meditas

- ★ Ora Ĵurnalo celebras jam unu jaron – la tempo flugas!
- ★ Mi ŝatas ke Renato Corsetti diras, ke komencantoj estas la sango de la esperanto-movado. Oni devas esti toleremaj al iliaj lingvaj eraroj. Eĉ Zamenhof iam estis komencanto.
- ★ De la memorfonduso de Carl Staaf la Gotenburga klubo ricevis 17 000 SEK. Al mi, Espe-Porko, kaj la biblioteko en Stannum eĉ ne unu krono iros. Nur al estontaj junaj komencantoj ekz. gimnazianoj en Gotenburgo kaj la ĉirkaŭaĵo. Oni volas sendi junulojn al esperantaj kursoj eksterlande, sed unue ili devas studi en Svedio.
- ★ Ni daŭre pensas pri Pollando. La albumo de Ingegerd havas multajn novajn bildojn.
- ★ Kiel poeto de novembro oni elektis Wisława Szymborska el Pollando. Ŝi ricevis la Nobel-premion pri literaturo en 1996.
- ★ Kvin membroj de la esperanta klubo de Gotenburgo iris observi birdojn en arbaroj. Du el ili ĵus denove estis en Pollando por observi polajn birdojn ĉe la maro.



- ★ U.N. proklamis la jaron 2019: "La jaro de la enlandaj lingvoj".
- ★ Mi konstatas ke la cigno estas la birdo de novembro.
- ★ Ĉu oni elektu la modernan nomon "sameo" aŭ la malnovan nomon "lapono"? Ĉu nur estas la sameoj de Svedio kiuj malŝatas la nomon "lapono? Kion diras la sameoj en Norvegio kaj Finnlando?
- ★ Finnlando estas interesa lando. Saliko donis al ni rakonton pri sorĉita parolanta domo.
- ★ Baltaj Esperantaj Tagoj en Litovio aŭ Universala Kongreso en Lahtio la venontan someron? Aŭ se eblas: kaj – kaj!

Kaj...urĝas trovi novan kasiston al SEF... Se vi trovos iun...bv. tuj sciigi min.....kaj vi ricevos.....

GRANDEGAN LAŬDON!!!! /Siv (elekta komitatano)



"Stadsteatern"

la "Urba teatro" de Gotenburgo. Sur la unua paĝo de Ora Ĵurnalo vi vidas ĝin kun la vortoj "Allt gott i världen = Ĉio bona en la mondo".

Multaj kaj grandaj teatraĵoj havis lokojn ĉi tie dum la jaroj.

Mi memoras speciale "Jösses Flickor" el la jaro 1974, kiu pli malfrue prezentigis ĉi tie en Gotenburgo. Tiam la demando pri egaleco ekaktualigis, sed daŭre ĝi estas aktuala en 2018.

Hodiaŭ estas alia demando.

"Allt Gott i världen" faris la demandojn kiamaniere ni devas ricevi homojn kiuj fuĝas. La grandaj demandoj ankaŭ temis pri amo, leĝo kaj juro, ekspluatado kaj la volo fari la ĝustan. Esti amikoj.

Multaj malfacilaj demandoj sekvis min sur la vojo hejmen.

/Ingegerd

Letero de Pollando



Mia amikino – mevo

Elwira Twardowska skribas:

Kara Siv

... La Oran Ĵurnalon mi kun granda intereso tralegis tuj. Ĝi estas vere gratulinda afero.

Dankon pro tiom da varmaj vortoj. Mi esperas, ke ĉi jara renkontiĝo estos bona komenco por Esperanto kaj por niaj interhomaj rilatoj. ...

Septembre mi partoprenis la pentrartan renkontiĝon en Frombork. Ĝi estas malgranda urbeto, fama en la mondo de tio, ke en ĝi dum multaj jaroj laboris fama astronomo Nikolao Kopernik – de tie li "haltis sunon kaj movigis la teron". La loko estas magia. Mi certas, ke ĝi plaĉus al vi.

Post la reveno hejmen atendis min multaj nerealigitaj taskoj – do mi ne povas plendi pro manko da laboro.

Ĉe ni post kelktaga abomena vetero revenis sunaj tagoj. La vento kaj ondoj estis tiel fortaj, ke sukcesis detrui parton de sopota moleo.

La 1-an de novembro ni festas Tagon de Ĉiuj Sanktuloj. Estas katolika festo, sed festata de ĉiuj. Tiun tagon ĉiuj vizitas tombejojn por starigi kandelojn kaj florojn sur la tomboj de proksimuloj. Tio estas tre bela kutimo. Ĉu en Svedio vi ankaŭ havas tian kutimon?



Salutoj al Vi kaj ĉiuj svedaj geamikoj. Ĝis baldaŭ! */Elwira*



Episkopa palaco kaj katedralo en Frombork

...Kara Elwira!

Dankon pro la laŭdo de Ora Ĵurnalo. Ni ĝojas!

... Jes, ni celebras la tagon de Ĉiuj Sanktuloj. Mi ŝatas ĉi tiun tradicion! Iomete antaŭe ni havas la usonan tradicion Halloween. Eble amuze por la infanoj, ne ĉiam agrable por la plenkreskuloj..... */Siv*



Ankaŭ Zamenhof iam estis komencanto

”kiu trovas komencanton trovas trezoron”

Artikolo de Renato Corsetti por Ora Ĵurnalo.

”Komencantoj estas la sango de nia movado!” li diras.

Certe ankaŭ Zamenhof iam estis komencanto kaj eĉ eraris pri la finaĵoj de la plej facilaj verboj. Ekzemple li skribis: ”Jam temp’ esta”, malgraŭ tio, ke ĉiuj scias, ke la ĝusta finaĵo de la verbo ”esti” estas ”-as”. Li poste lernis kaj fariĝis tre bona verkisto en Esperanto malgraŭ tio, ke ĝis la lastaj jaroj li foje uzis neologismojn, kiujn oni poste ne akceptis.

Tra la jardekoj mi daŭre aŭdis plendojn pri la komencantoj, ĉefe pri la eternaj komencantoj, kvankam la problemo en nia movado estas, ke ni havas tro malmultajn komencantojn, ĉar komencantoj estas la sango de nia movado.

Komencantoj aĉetas librojn por provi legi en la nova lingvo. Komencantoj entuziasmas pri lokaj kaj landaj kunvenoj, kie ili povas renkonti realajn homojn, kiuj vere parolas tiun lingvon, kiu ĝis nun estis por ili nur komputila ludo.

Antaŭ la reta epoko oni sciis, ke komencanto post la tria leciono verkis sian unuan poemon en Esperanto. Nun post la tria tago komencanto sendas sian unuan mesaĝon al Facebook/Fejsbuko ”Mi lerni pasinta sabato. Kiu volas paroli kun mi skajpe?”

Sen komencantoj ni estus nenio. Ni estus la kutimaj maljunaj samideanoj, senrevigitaj pri la fina venko, tedataj de la revuo de UEA, kiu anoncas grandajn sukcesojn, kiuj apenaŭ ekzistas, cinikaj pri la kongresoj kaj la festparoladoj, nekontentaj pri la klubaj kunvenoj, ktp. ktp.

Do, mi pledas por tio, ke oni donu pli da atento al komencantoj je ĉiuj niveloj, urba, landa, monda. Mi konas plurajn lokajn klubojn, kie la spertaj esperantistoj ĉiurimede provas forpuŝi novajn homojn, kiuj aperas, kaj ne povas tuj la unuan vesperon kompreni la brilan prelegon de la kluba prezidanto en literature pretenda Esperanto. Oni komprenigas al ili, ke ili revenu kiam ili flue parolas la lingvon, kaj ili neniam reaperas.

Mi konas plurajn landajn asociojn, kiuj entute ne zorgas pri informado kaj instruado, por ke estu komencantoj, sed male dediĉas siajn

energiojn al traduk-konkursoj kaj literaturaj premioj por ke la spertuloj ricevu iom da kontentigo dum la membronombroj faladas kaj ne aperas novaj homoj, kiuj povus legi la premiitajn verkojn.

Mi konas kelkajn mondajn asociojn, sed ĉefe UEA-n, kiuj pensas, ke la laboro produkti komencantojn estas laboro por la simplaj esperantistoj je landa kaj loka nivelo, sed ne por ni, la supera kremo de la kremo. La sekvoj estas sub ĉies okuloj, kaj neniu el la internaciaj funkciuloj komprenas, kial fabriko de komencantoj kiel Duolingo estas tiel popol-fama inter esperantistoj.

Estas tempo, aŭ ”Jam temp’ esta” por repreni la frazon de la komencanta Zamenhof ŝanĝi nian sintenon al komencantoj, kaj aktive serĉi ilin kaj zorgi pri ili. Estus tempo, laŭ mi, ke UEA lanĉu revuon por ligi al la movado ĉiujn retajn komencantojn de la mondo. Ne plu estu komencanto, kiu ne havas indikon pri la movado ĉirkaŭ li loke, lande kaj monde.



Mi ne povas rezisti la tenton rakonti pri juna israelano, kiu antaŭ kelkaj jaroj lernis Esperanton en reta kurso en la angla kaj poste pensis, ke estas bedaŭrinde, ke ne ekzistas lernolibro kaj vortaro en la hebrea kaj verkis ilin kaj nur poste malkovris ke da tiaj ekzistas pli ol oni sukcesas vendi, ke ekzistas israela asocio, ke Zamenhof mem estis judo. Do, mia slogano "Kiu trovas komencanton, trovas trezoron" estas plene pravigita. Ni kune serĉu tiujn trezorojn.

/Renato Corsetti

Karaj legantoj – aparte komencantoj: Por vi Renato Corsetti montras ke la Esperanto-movado aprezas vin – aŭ almenaŭ devas aprezi vin! Kun aŭ sen via sperteco pri la objekta finaĵo –N, ni bonvenigas vin. De Wikipedio mi prenas la sekvan informon:

Renato Corsetti, lingvisto el Italio, estis la prezidanto de UEA (Universa Esperanto-Asocio) inter 2001 kaj 2007. Li naskiĝis 1941 en Romo. Li instruas pri psikolingvistiko ĉe Sapienza Universitato de Romo. Li ankaŭ aktivis en la Akademio pri Scienco San Marino. Li eldonis faklibrojn en esperanto kaj pri esperanto.

Lia edzino, Anna Löwenstein, ankaŭ eldonis esperanto-librojn. Mi tre ŝatas ŝian romanon "La ŝtona urbo". Legu ĝin! Post 2015 la paro loĝas en Britio.

Sen Fejsbuko mi neniam havus kontakton kun tiu sperta kaj ankaŭ tre humila esperantisto. Do, uzu Fejsbukon kaj trovu tre interesajn samideanojn! /Siv

La ŝtona urbo – romano, kiun vi nepre legu!


En la monda literaturo ne mankas noveloj, kies fono estas la Roma Imperio en la frua periodo de la kristana epoko. Oni pensas unuavice pri *Quo vadis?* de la pola aŭtoro Sienkiewicz. Pro tio estas interese legi la komenton de Gerrit Berveling en *Fonto*, cititan sur la malantaŭa kovrilo de *La ŝtona urbo*: "... La romano egalas la teman kaj rakontadan amplekson kaj impresivon de *Quo Vadis?*, sed bonŝance sen ties historiaj stultaĵoj, naciismaj troigoj kaj sukereca propagando por iuspeca kristanismo... La *Ŝtona Urbo* simple estas vivo. Gratulon al la aŭtoro!". Samtempe, William Auld, en sia *Antaŭparolo*, taksas ĉi tiun verkon "estonta klasikaĵo de nia literaturo".

Mi ne povas malkonsenti kun ĉi tiuj respektindaj opinioj. Inter ĉiuj romanoj pri simila temo, kiujn mi iam legis, mi memoras neniun, kiu tiom kaptis mian imagon,

retenante ĝin ĝis la lasta vorto de la lasta ĉapitro. Kvankam la libro unue aperis en la angla lingvo, la esperanta traduko (farita de la aŭtorino mem en klara fundamenta lingvaĵo), estas tiel elstara, ke oni preskaŭ havas la impreson, ke ĝi estas originala verko.

En ĉi tiu romano, Bivana, kelta virino, rakontas la historion de sia vivo, komencante de sia infaneco en suda Britio. Ŝi priskribas la tagan rutinon simplan kaj monotonan (sed poste nostalgie

memorotan) de keltaj vilaĝanoj en la tempo, kiam la romanoj provis konkerti tiun regionon. Kiel juna knabino, Bivana devas helpi la patrinon pri la hejma laboro ĉirkaŭ la familia kabano. Poste, kiam ŝi pli alproksimiĝas edziniĝo-aĝon, ŝia onklino inicas ŝin en la misterojn de tinkturado, uzante kolorojn elprenitajn el kreskaĵoj kaj aliaj naturaj fontoj. (Parenteze, antaŭ nur



unu aŭ du generacioj, tiuj metodoj estis ankoraŭ uzataj en la keltaj regionoj de la Britaj Insuloj.)

Ĝis tiam, Bivana estis kontenta pri sia trankvila vivo, kaj apenaŭ ŝajnis ĝenata pro la sovaĝe kruelaj druidaj kutimoj, kiuj laŭregule, dum la frusomera kaj aŭtunfina festivaloj, interrompis tiun trankvilon.

Iutage, tamen, tiu mondo de ŝia kontenta juneco estis por ŝi tute detruita, kiam romiaj soldatoj atakis ŝian vilaĝon. Bivana, kune kun aliaj junaj kunvilaĝanoj, estis kaptitaj kaj ŝipe transportitaj al Romo, kie ili estis venditaj kiel sklavoj. Ŝia sorto estis iom pli bona ol tiu de ŝiaj kunulinoj, ĉar la familio, kiu aĉetis ŝin, estis estrata de relative humana mastro de kampara vilao.

Kvankam la priskribo de la vivo en la romia familia medio konsistas el ordinaraĵoj: kuirejoj kaj legomĝardenaj taskoj, pariĝo inter

kunsklavoj, malofta naskiĝo de infanoj, mamnutrado, impresoj pri romiaj latrinoj (!), vizitoj al la publika banejo, kaj kelkfoje, arbitra kaj severa punado – ĝi neniel iĝas teda aŭ malinteresa.

Mi ne deziras malpliigi la plezuron de estontaj legantoj per antaŭtempa malkaŝo de la tuta intrigo. Sufiĉu diri, ke ŝanĝiĝas la situacio de Bivana (nun nomita Barbara de ŝiaj gemastroj), kiu estas serioze trafita de gravaj eventoj en Romo.

Kiel jam notis en siaj komentarioj Auld kaj Berveling, la priskriboj de la vivo en la kelta Britio kaj en la Roma imperio estas vere majstraj. Oni vidas, ke la aŭtoro zorge esploris la keltan kaj romian fonojn de sia rakonto. Aĉetu la libron tuj, kaj mi promesas, ke vi ĝuos nekutime plezurigan frandaĵon.

Garbhan MacAoidh

Polmo de Wisława Szymborska

(1923 – 2012) pollandino, kiu ricevis la Nobel-Premion pri literaturo en 1996.

Polmo

Dudek sep ostoj,
tridekkvin muskoloj,
ĉirkaŭ du mil nervo-ĉeloj
en ĉiu el miaj kvin fingropintoj.
Tio tute sufiĉas
por verki Mein Kampf
aŭ Winnie-La-Pu.



Tradukis en esperanton Lidia Ligęza.

UN-koncerto en la preĝejo de Angered



Dum la provripeto.

La muzika kafejo lunde en la 22:a de Oktobro temis pri UN kaj paca laboro.

Repertuaro:

”Kantoj povas porti” Teksto de Egil Franzén, 9-jara, kaj muziko de Stefan Nilsson, 36-jara.

”Koloroj en vento” Teksto de Monica Forsberg kaj muziko de Alan Menken.

”Goliat” de Laleh Pourkarim / Gustaf Thörn.

”Vi pensu” de Darin.

”Imagine” de John Lennon.

”Heal the world” de Michael Jackson.

(UN = FN)

Kantoj por libereco...

Mi vizitis koncerton kun la ”projekthoro”, kiun Fredrik Söderberg estris.

Fredrik estas unu el la kantoj en la preĝeja komunumo de Angered.

Ni en la komunumo estas dorlotitaj de diversaj grandaj muzikaj travivaĵoj en la preĝejo de Angered. Ĉiuj, kiuj praktikas muzikon en iu formo – ludas instrumenton aŭ ŝatas kanti – povas eniri la muzikan vivon.


”Kanto al la libereco” de S. Rodrigues kaj sveda teksto de Björn Afzelius.

Estis vere bona koncerto kiun multe da homoj aŭskultis.

Nun ni esperas pri paco en la mondo...

/Ingegerd

Kelkaj el la UN-tagoj en novembro: 6/11 La internacia tago por bari la ekspluatadon de medio en militoj kaj armitaj konfliktoj, 10/11 La mondtago de scienco por paco kaj evoluo, 20/11 La internacia infantago, 25/11 La internacia tago kontraŭ perforto al virinoj.



Nekutima vizito ĉe la trejnpado

La 31an de oktobro Margareta Andersson kaj mi promenis laŭ arbara trejnpado. Post kelkaj centoj da metroj grupo da personoj staris kun la fotiloj direktitaj al apuda bosko.

Kaj tie sidis eta Lapona strigo ĉe piceotrunko. Ĝi turnadis la kapon diversdirekte dum kiam ni staris kaj ĝuis la nekutiman observadon.

/Naturpeco de Jan Hellström (kiu ankaŭ fotis)

La samea kabano el torfo apud Trollsjön (trola lago)



Antaŭ kelkaj jaroj la Samea Asocio de Gotenburgo havas bonan kunlaboron kun la paroĥo de Angered.

Mi, kiel proparolanto de ambaŭ asocioj, kunligis ilin kaj nun ankaŭ la Esperanto-Asocio havas kunlaboron kun la sameoj, riĉan, multjaran kunlaboron, pro kio ni aparte dankas Johannes Marainen.

Ĉu ni esperu ke ni estontece havu esperantan kunvenon ĉe tiu mirinda loko? La temo povus esti: "Kiel lingvaj minoritatoj apogu unu la alian."



Ĉiukaze la dimanĉa diservo kun la paroĥo de Angered (Svenska kyrkan i Angered) fariĝis

sukcesa investo kaj por homa sano kaj por la komuneco.

Sabate, la 13an de oktobro, 2018

Emelie Holmgren, pastro de Gällivare, vojaĝis la longan vojon por havi la eblecon stari ĉe la rando de Trollsjön kaj honori kaj Dion kaj la Samean Asocion.

Ŝi gvidas diservon kaj en la samea kaj en la sveda. Ankaŭ enhavas jojko, kiu metas sian belan sonlingvon kiel arĝentobrilan nebulon super la lagon. Momento de harmonio!



Vera boligita kafo

Finfine ni ricevis la permesitan kafon kun speciale bakitaj panoj, buteron kaj fromaĝon. Kelkaj prenis la okazon viziti la samean torfan kabanon, kiu hodiaŭ estis malfermita. Iu trovis fungojn en la arbaro, aliaj nur ĝuis la belan veteron. /Ingegerd

U.N. proklamis la jaron 2019: "La jaro de la enlandaj lingvoj". Do ni pli multe kunlaboru kun la parolantoj de niaj kvin minoritaj lingvoj.


Alia komento: Pri la dometo sur la unua bildo la nura vorto en la vortaroj por "lappkåta" estas "lapona tendo el torfo". Sed la sameoj malŝatas la vorton "lapono". Ĉar la dometo ne similas al tendo, ni preferas la vorton kabano. Ni skribas: "La samea kabano el torfo" kaj atendas la reagon de la legantaro. /Siv

El la albumo de Ingegerd – bildoj de Pollando



→ Palmira havas zorgojn:
La gvidanto kuras, li vere
kuras! Kie li estas?

← Lucyna estas survoje kaj
prizorgas la biletojn por la grupo.



← Rigardu la trolebuson! Kiu
kuraĝas veturi per ĝi, vidinte la
filmon "Jönssonligan" en Pollando.



→ Andreo Bach kun amiko survoje
al la esperanto-kverko en Gdynia.



← La kverko por la Espero!

→ La tuta grupo, kiu esperas...



← Ĉe la monumento por la
"kaŝubanoj" Andreo Bach
faras manifestacion.

→ Sur la strando en Gdynia.
La varma sablo estas mirinda
sub la piedoj...





← Miksaĵo de svedoj, poloj kaj litovoj en la Gdyniafesto.

→ Preparoj por la ĉapelpromenado.



← Du amikinoj en Sopot! Siv kaj Harriet ĝojas.

→ Kiu estas sub la ĉapelo? Ĉu estas Ingrid aŭ filmstelulino?



← Lasse observas la litovan manifestacion por Esperanto.

→ Sur la vojo al la strando!



← Ni estis garditaj!

→ Balonoj, verdaj balonoj!






← "Hisu la velojn" – la kantistoj atendas por kanti.

→ Nun ni kantas sur la scenejo.

Tri uloj, tri uloj el Esperanta land' nun venas, nun venas al Sopot-sabla strand'.




← La esperanto-kverko de Sopot.

→ La memorŝtono ĉe la kverko.



← Torento-rivereto.

→ La memorŝildo pri la inaŭguro de la arbarherbejo kun la kverko kaj la ŝtono.




← Lucyna kun la fianĉino de Espe-Porko en Gotenburgo. "Je via sano!"

→ Tri fortaj virinoj ŝovas la esperantan lingvon antaŭen.




← La suno en Gdansko estas Elwira.





← Stevardino en la "Wizza" aviadilo.

→ Ĝis revido!



← Adiaŭ Gdansko!

→ Hejme en Gotenburgo – pluvas!



Wisława Szymborska

"Parabolo"

Fiŝkaptistoj elteris rete el la marprofundo botelon. Ĝi entenis paperon kaj sur ĝi la vortojn: "Homoj, savu min! Mi estas ĉi tie. La oceano elĵetis min sur insulon sen homoj. Mi staras ĉe borde kaj atendas helpon. Rapidu. Mi estas ĉi tie!"

– Mankas la dato. Certe jam tro malfrue. La botelo povis longe naĝi en la maro – diris unu fiŝkaptisto.

– Ankaŭ la loko ne estas fiksita. Oni eĉ ne scias, kiu oceano – diris alia fiŝkaptisto.

– Nek tro malfrue, nek tro malproksime. La insulo "Ĉi tie" estas ĉie – diris la tria fiŝkaptisto.

Fariĝis neagrabla, ili eksilentis. La ĝeneralaj veroj estas ĝuste tiaj.

Tradukis en esperanton: Tomasz Chmielik.

Ĉenoj

Varmega tago, hunda budo kaj hundo kun ĉeno.

Kelkajn paŝojn de tie pelveto da akvo.

Sed la ĉeno tro mallonga kaj hundo ne atingas.

Ni aldonu al tiu ĉi bildeto ankoraŭ unu detalon:

niajn multe pli longajn kaj malpli videblajn ĉenojn,

dank' al kiuj ni povas libere preteriri apude.

Tradukis en esperanton Lidia Ligeza.



Wisława Szymborska

Bonvenon al la verda Gotenburgo!

El artikolo de **Göteborgs-Posten** kun supra rubriko, 18 oktobro, verkita de la ĵurnalisto Lars O. Carlsson.

Mi citas la tekston de Lars O. Carlsson (nur iomete mi mallongigas ĝin):

”Ĵaŭdon, la 11an de oktobro ni skribis sur ĉi tiu gazeta paĝo (en Göteborgs-Posten) pri granda skandinava esperantokongreso, kiu okazis en Gotenburgo en 1918. Tiam ni ankaŭ komentis samtempan foton, preniton el la gazeto 'Hvar 8 dag' de la sama jaro. Tie la spektanto povus esti impresita de la abundaj lipharoj de redaktoro Paul Nylén.

El la mejloj de la legantaro, ni pruntas kelkajn salutfrazojn de Bo Sandelin, emerita profesoro ĉe la Komerca Akademio de la gotenburga universitato, kiu siavice pruntis la sekvan formulon pri Paul Nylén el porjubilea eldonaĵo de 1942:

'vizaĝo kiu preskaŭ nur konsistas el lipharoj kaj okulvitroj; sed malantaŭ la okulvitroj kaŝas sin trezoro de saĝaj kaj elokventaj eldiroj'

Bo Sandelin ankaŭ skribas, ke jubilea kongreso okazis en majo ĉi tiun jaron por celebri la centjaran memoron de la skandinava kongreso.



De maldekstre: Valdemar Langlet, Paul Nylén kaj Jan Strönné – tri elstaraj esperantistoj. Bv gugli, se vi volus scii pli pri ĉi tiuj eminentuloj. Pri Valdemar Langlet vi povus legi en Ora Ĵurnalo numero 8. (Arkivbild. Wikipedia commons.)

Bo Sandelin faris plurajn verkaĵojn ĉefe pri ekonomio kaj ekonomia historio, sed antaŭ kelkaj jaroj li publikigis la libron 'Esperanto – la revo pri monda lingvo' (svede: Esperanto – drömmen om ett världsspråk). Temas pri la historio de la Esperanto-movado, sed ankaŭ pri ties evoluo dum pri malfruaj tempoj.

Dise en Svedio kaj la ĉirkaŭaĵo ekzistas esperantokluboj – ankaŭ en Gotenburgo, sed eble la plej multaj kontaktoj nuntempe okazas interrete. Tie oni povas trovi "Ora

Ĵurnalo", eldonatan de 'Esperanto-Societo de Gotenburgo' ('Gyllene tidning från Göteborgs Esperantoförening').

Ni prezentu plian lingvoekzercon. En la somera numero de la unua paĝo de ĉi tiu gazeto ni trovas jenan rubrikon: 'Al la tuta mondo: Bonvenon al la verda Gotenburgo!' "

Lars O Carlsson ŝercas pri la vorto "tuta", kiu en la sveda signifas hupi.

Ni ĝojas ke li vere skribis pri esperanto en nia plej granda gotenburga gazeto, Göteborgs-Posten. Bonege! /Siv

Dialogo kun Domo de Raita Pyhylä, Finnlando

Estis printempo. Malantaŭ altaj malhelverdaj piceoj kaj floranta siringoheĝo mi subite ekvidis helan lignan domon, kiu ŝajnis iom dormema kaj ne prizorgata. La fenestroj de la verando blinkis al mi: *Ni konatiĝu! Envenu!* Sur la tegola tegmento



kreskis verdaj makuloj de musko. La kamentubo staris senfuma kaj nigra kontraŭ la blua ĉielo. Mi ĉirkaŭiris la domon por trovi pordon. Miaj piedoj malsekiĝis en la herbejo. Ie fajfadis merlo.

Trovinte la enirejon mi bedaŭris ke de sur la pordo la bruna farbo jam komencis deskvamiĝi.

Bonvenon, oscedis la pordo kaj grincigis siajn ĉarnirojn. Ne timu!

La verandon plenigis matena sunlumo ludanta per senkandela lanterno.

Pardonu ke mi aspektas nude kaj malvarme. La loĝinto forigis la kurtenojn kaj tapiŝojn. Se vi restos, metu florojn ĉe miaj fenestroj kaj



koloran tapiŝon sur mian plankon, sed unue purigu la griziĝintajn vitrojn. Oni ne bone vidas tra ili.

Mi jam sentis ke la domo kaj mi ekamikiĝas. Malantaŭ la sekva pordo mi trovis vestiblon. De la plafono pendis helruĝa ovoforma lampo, kiu pensigis min pri la stilo de la antaŭa jarcento.

Ŝaltu min, ĝi flustris sopirante lumon. Vi vidos pliajn pordojn.

Mi malfermis unu el ili kaj trovis min en kuirejo.

Ho kiel bone ke finfine iu envenas, salutis min nigra fornelo, per kies fajro oni iam kuiris. De longe mankas al mi

varmo kaj zumadoj de bolantaj kaseroloj. Ĉu vi ne dezirus hejti min kaj pretigi kafon por vi? Vidu, jen la ŝtala kafopoto. Ne uzu la kupran, ĝi rolas nur kiel ornamaĵo, en ĝia eno mankas stano kaj tial ĝi povus esti venena. Vi trovos akvon en la puto. Iru pumpi! daŭrigis la babilema fornelo.



Pardonu, mi unue deziras vidi la ĉambrojn, diris mi. Kaj mi ja devas trovi sitelon kaj padon al la puto. Ĝi ne jam trafis miajn okulojn.

Ne! Ne! Ekbruligu tuj, iru por la akvo poste! Mi estas tiel malvarma kaj mi bezonas longan hejtadon. Jen la alumetoj sur la breteto. Kaj tie brulligno kaj betula ŝelo por plifaciligi la ekbruligadon. Ĉu vi scias kiel fari?

Jes, jes. Mi bonvolis plenumi la peton de la rustiĝinta fornelo, sed ne estis facile. La fumo ne eniris la kamentubon sed volis bloviĝi en la kuirejon. Longe mi provadis, tuisis, skrapadis alumetojn, esperis kaj malesperis. Finfine

aŭdiĝis la sopirata zumado, kiun kaŭzas la aero supren tirata de la trafluo en la kamentubo. La flamoj vidiĝis tra la fendoj inter la metalaj ringoj de la fornelo. Kia ĝojiga vidaĵo!

Dankegon, flustris la fornelo. Nun iru por la akvo. Mi longe pumpis kaj lasis la stagnan akvon forflui antaŭ ol mi plenigis mian sitelon. Mi surpriziĝis ke la fluo de la travidebla akvo ĵetas sian ombron sur la teron apud la puto. Mi memoris ke la samon mi iam vidis en mia infanaĝo. Denove mi



aŭdis merlojn pepi en la veproj. Ĉu ili nestas ĉi tie?

Portinte la sitelon en la kuirejon mi plenigis la kafopoton per akvo kaj metis ĝin sur la fornelon kaj emis daŭrigi la esploradon.

La sekvan ĉambrom lumigis du fenestroj, unu donis al la oriento kaj la alia al la sudo. Tie ĉi mi ŝatus dormi, mi pensis. La lito, tirkestaro, ovala tablo kaj solidaj seĝoj estis farbitaj turkise. Oni vidis ke ili estas manfaritaj, ne en fabriko. De la plafono pendis fragila vitra lampo kun flavaj kaj verdaj perloĉenetoj.

En unu angulo staris impona blanka kahelforno. *Mi estas senutila kvankam bela, ĝi suspiris. La fumo ne plu trovas sian vojon el mi en la kamentubon, neniu scias kial. Tial mi ne povas hejti, kvankam mi ŝatus servi. Kredu min, ne indas provi. Iru for!, ĝi raŭke kaj amare murmuris.*

En la sekva ĉambro la kahelforno estis servema kaj en ordo. *Mi ne enblovas fumon, ĝi fiere promesis. Mi povas hejti du ĉambrojn.*

La klapon de la fajrejo atentokapte ornamis araneo kaj araneaĵo el metalo. Neniam mi estis vidinta tiaĵojn. Mi tamen ne nun deziris

varmigi min sed daŭrigi la esploradon. Min jam logis la subtegmentejo.

Kvankam mi ĝentile dankis la fornon, ĝi grumble respondis: Iru, iru! Jam du jarojn mi atendis, mi povas pluatendi horojn aŭ tagojn, sed ne forgesu reveni. Plurjaran atendadon mi ne eltenos.

Spirala bruna ŝtuparo knaris sub miaj piedoj. Mia kapo batigis kontraŭ io malmola, kio miaopinie ne devus esti tie. La klapo movebla! Diveneble planita por teni la varmon en la suba etaĝo kaj ne lasi ĝin "aliri al pigoj", kiel miaj geavoj kutimis diri. Lampoj nenie troveblis, la subtegmento estis senelektra. Ho ve! Malkomforta malhelilo! Palpante mi tamen trovis pardonon al ĉambro kun grandega fenestro. Tiam mi ekvidis ke de la tegmento-plafono pendas malnova virina biciklo kaj paro de ŝuoj plektitaj el paperŝnuro. Tiajn ŝuojn oni fabrikis dummilite, kiam ledo mankis.

Ĉu mi ne estas interesa, diris la biciklo. Mi estas historia. La vilaĝa akuŝistino uzis min antaŭ sesdek – okdek jaroj. Ŝi bezonis min por rapidi al naskontoj. Kelkfoje ŝi bezonis remboaton, se la naskanto loĝis en alia



insulo. Alifoje oni veturigis ŝin sur ĉevala ĉaro. Imagu la distancojn kaj malhelpojn en tiu ĉi insularo, la ondojn, ŝtormojn. Ne estis facila vivo. Vintre ŝi bezonis skiojn, se neniu venis per sledo.



Ĉu ŝi havis familion? Ĉu oni ne telefone vokis ŝin? Ŝi vidis sufiĉe da mizero en la bienetoj de la fiŝkaptistoj. Ŝi vidis dolorajn naskojn. Ĉiudiarne ŝi devis deĵori 24 horojn. Ne troveblis anstataŭantoj. Ŝi estis inter la unuaj profesiaj akuŝistinoj de la lando, la vere unua en sia regiono. Nekredeble sed telefonon ŝi ne havis, murmuris la biciklo. Poste ĝi silentis digne kaj serioze. En angulo de la subtegmento min surprizis orece enkadrigita spegulego kaj samstila tualet-tableto lama kaj malstabila.

Ankaŭ la laborema akuŝistino revis pri pli komforta vivo, sciigis la spegulo al mi. Ŝi ŝatis sidiĝi ĉe mi, provadi novan bluzon aŭ kaptukon, vidi sian vizaĝon kaj taksi, ĉu ŝi estas bela. Ŝi ie havis sekretan koramikon, pri kiu oni nur klaĉis. Min ŝi aĉetis je alta prezo, longe ŝparinte.

Sub la tegmento pendis sur stango elmodiĝintaj nigra mantelo kaj blua robo. Mi ririgardis la ŝuetojn ĉe la biciklo. Kiajn malgrandajn piedetojn la virino havis! Nuntempe nur infanoj havas tiajn. Kaj tamen ŝi certe marŝadis dekojn da kilometroj en la roka, arbara, kelkloke marĉa tereno. Ho, ho, kia virino admirinda!

El la fenestregoj mi vidis la maron, ne grandan vastaĵon, sed duoninsulon, insuletojn ĉe la horizonto, densan fragmitaron, kiun la vento lulis. En la korto blanke floris tri maljunaj dikaj pomarboj, prunarbo, ĉerizarboj. Burĝonis grandaj grupoj de peonioj. Ĉirkaue kreskis aceroj, fraksenoj, betuloj. La altaj malhelverdaj piceoj ŝirmis la korton de la vento. La akuŝistino certe deziris beligi sian loĝlokon, kie ŝi devis deĵori tage kaj nokte. Ŝi ne pigrumis.

Mi malsupreniĝis, trovis la akvon bolanta en la kafopoto. *Ekloĝu en mi*, zumadis la tuta domo. *Mi rakontos al vi pri miaj memoroj.*

Saliko (Raita Pyhälä)



Lahtio ĝoje invitas esperantistojn al la 104-a Universala Kongreso de Esperanto!



Lahtio (Lahti, Lahtis) estas urbo en suda Finnlando, 100 kilometrojn nordoriente de la ĉefurbo Helsinko. Kun preskaŭ 120 000 loĝantoj, Lahtio estas la oka plej granda urbo en Finnlando.

Lahtio estas fama pro siaj skisaltejoj kaj radiomastoj, sed ankaŭ pro Sibelius-domo, konstruita en la jaro 2000. Tie okazas multaj koncertoj, kongresoj kaj aliaj kulturaj eventoj. Sibelius-domo ricevis sian nomon de la fama finna komponisto, Jean Sibelius.



La skisaltejoj gastigas internaciajn sportemulojn ĉiuvintre dum la famaj

konkursoj de Salpausselkä, *Salpausselän kisat*.

La pura kaj trankvila finna naturo, kun siaj lagoj kaj arbaroj, kviete brakumas la urbon. Post kvinminuta piediro for de la urbocentro troviĝas la bordo de la lago Vesijärvi kaj la haveno, kiun multaj Lahtianoj konsideras kiel sian plej ŝatatan lokon en la tuta urbo.

Fonto: <https://eo.m.wikipedia.org/wiki/Lahti>

Fotoj: Sofia Bister

Paroĥa kunsido antaŭ 100 jaroj en Stora Lundby

(=Gråbo), teatraĵo la 15an de septembro en la biblioteko de Gråbo.

Mi ricevis la manuskripton de la teatraĵo. La manuskripto baziĝas sur vera protokolo. Jen la unua parto de la teatraĵo:

”Ĉiuj membroj krom la prezidanto Adelsköld kaj Laseras August en Hällingsbo jam sidis ĉe longa tablo. Aron parolas pri la kostoj de la nova tombejo.

La laboristoj nun postulas 2,50 tage. Tro multe laŭ li.

La terposedanto Adelsköld, komunuma prezidanto, envenas, kapklinas al ĉiuj, turnas sin al la kasisto Eriksson (Magnus) dirante: ”Kio okazas en Burhult? Mi ricevis skribon kun la teksto, ke mi devu ripari la vojon inter Burhult kaj Björboholm. Mi ne uzas tiun vojon.”



Sur ambaŭ bildoj: Magnus (membro de la gotenbarga e-klubo) estas numero 3 de maldekstre.

Eriksson: ”Ni ne pagu eĉ unu oeron! Kiam la terposedanto Adelsköld kaj mi faras arbarlaborojn ĉiam estas glitvetero. De mi la komunumo havu nenion!”

Kristinas Adel: ”Ho, ho, potencaj sinjoroj, potencaj sinjoroj. Grandaj arbaroj, grandaj arbaroj, sed neniaj

vojoj, neniaj vojoj. Vojojn ili ne povas prizorgi.”

Adelsköld akre haltigas Kristinas Adel kaj komencas la kunsidon.

Unu el la punktoj koncernas eventualan enkondukon de impostoj super hundoj. Ĉu diversaj pagoj por diversaj hundoj?

Tollas John: ”Höggår'n havas grandan hundon, kiu ĉiam bojegas. Li devas havi grandan pagon.”

Intertempe
Laseras August
lamante venas.
Rigardante sian
horloĝon, li
diras. "Kial vi
komenciĝis tro
frue. Mi ja
altempigis mian
horloĝon al la
horloĝo de
Rundkvist kiu



altempigas la sian al la tempoj de la trajnoj. Ŝi (oni tiame nomis la horloĝon ŝi), ŝi havas kvin minutojn antaŭ la kvara. Kial vi komenciĝis tro frue?"

La prezidanto ridetas: "Nun estas kvarono post la kvara kaj ni devas rapidi amikoj miaj!"

Kristinas Adel: "Estas bona ideo havi diversajn impostojn por diversaj hundoj!"

Eriksson (sen petante la parolon): "Gardu vin, Adel, por ke ni ne postulu impostojn sur viaj oksoj. Tiaokaze viaj impostoj estus grandaj, sed viaj rimedoj ja permesas tion."

La prezidanto Adelsköld: "Ĉu la temo estas findiskutita?"

Ĉiuj: "Jeeees!"

La prezidanto: "Ĉu ni havu hundimpostojn?"

– "Jeeees!"

La prezidanto: "Kiom alta la pago estu? Kvin kronojn por grandaj hundoj kaj 3 por malgrandaj..... kaj la mono iru al la budĝeto".

Laseras August: "Ni devas sekvi la leĝon! Mi nun legas ĝin kaj nenio estas skribita pri diversaj impostoj por diversaj hundoj."

Tollas John: "Kontraŭleĝan decidon mi ne toleras!"

La prezidanto: "Jen du proponoj, la unua pri kvin kronoj kaj due mia propono 3 kronoj por ĉiuj hundoj. Kiuj voĉas por kvin kronoj?"

(Ĉiuj voĉas por kvin kronoj, krom Eriksson kaj la prezidanto.)

La prezidanto:
"Kiuj voĉas por tri kronoj?"
(Eriksson kaj la prezidanto levas la manojn.)

La prezidanto: "Mi trovas ke la kunsido decidis ke la hundimposto estu 3 kronoj."

Li batas la martelon.

La subparohestro Stave stariĝas: "Voĉdonon! Estas eraro!"

La prezidanto: "Jes estas erare peti voĉdonon post la martelbato!"

Stave malrapide sidiĝas. Nova martelbato – – – kaj tiel la kunsido pluiras.

Ankaŭ temas pri novaj pupitroj en la lernejo kaj aĉeto de fajropumpilo. Ĉiuj membroj de la kunsido vere ne povas influi sur la decidoj, kiam la riĉuloj jam decidis. Neniu demokratio!

Bone ke la biblioteko aranĝas teatraĵojn. Post konstruado de kvin altaj domoj kaj multaj vilaoj la loĝantaro de Gråbo kreskis. Novaj gråbo-anoj ja devas scii ion pri iamaj tempoj en Gråbo.

La nomo Gråbo (Grizejo) devenas de 1900, kiam la fervojo Västgötabanen estis preta. La farmistoj ne volis pagi por kvotoj en la fervojo kaj la estro de la fervojoj en Vastragotio punis la enloĝantojn nomante la novan stacion "Grizejo". En 1967 la lasta trajno trafikis Gråbo. Nun oni povas bicikli al Gotenburgo sur la vojeto, kiu antaŭe estis fervojo.

La aktoroj ricevis varmajn aplaŭdojn.


Bonege!!!! /Siv

Promeno kun pli ol 50 birdobservantoj, la 25an de oktobro



Jan kaj Margareta logis Ingegerd, Magnus kaj min partopreni en kvarkilometra promenado en Lerum kaj Härryda por esplori birdojn. Mi vidis kelkajn pigojn kaj aŭdis birdetojn. Sed la spertuloj per siaj binokloj spektis verdajn pegojn, trogloditojn, pirolojn kaj aliajn. Tamen mi nun konas la esperantajn nomojn de kelkaj novaj birdoj.

Mi fotis parton de la partoprenantoj sur la parkejo.



La radioj de la suno trabrilas la arbaron ĉe Bävsjöryd (Jan fotis).



Mi fotis Ingegerd ĉe la celo: Härsjön.

Sume estis interesa promenado, sed miaj piedoj diras ke la distanco estu pli ol kvar kilometroj. /Siv

Muta cigno

Tute maltimanta homojn, la muta cigno dum la jaroj donis streĉan historion pri ĉasteco kaj amo. Dum la tempo de kovado ĝi prigardas la teritorion elsiblante kiel serpento.

La vircigno povas esti timiga kiam li naĝas kontraŭ entrudantoj kiel blanka fantomo kun sia tute blanka plumaro kaj la flugiloj streĉitaj super la dorso.

La muta cigno estas 140 – 160 centimetroj longa kaj la enverguro inter la flugilpintoj estas 208 – 238 centimetroj.

La muta cigno estas impresa birdo. /Ingegerd



H C Andersen

– la reĝo de la belaj fabeloj!



H C Andersen naskiĝis la duan de aprilo, 1805 en Odense.

La patro laboris kiel ŝuisto antaŭ ol li eniris la militon de Napoleon.

La patrino kontribuis al la familio kiel purigistino.


Estas ordinara kaj povra frua junaĝo de H C Andersen.

En sia infanaĝo li ofte ludis sola kun sia pupteatro. Li ankaŭ revis, ke li estos granda aktoro en la teatroj. Li estis sola knabo kaj havis problemon en la lernejo. Li ne funkciis kun nek instruistoj nek amikoj. Post lernejo li komencis eldoni librojn. En la jaro 1835 li eldonis "Aventuroj por infanoj" kaj en 1845 la libron "Novaj aventuroj" kiu enhavas la fabelon "Malbela anasido". Oni pensis ke la fabelo temas pri H C Andersen mem.

H C Andersen mortis en la jaro 1875 sed liaj fabeloj vivas kaj estis tradukitaj al multaj lingvoj.

Ekzemploj de fabeloj:

1. Malbela anasido
2. Reĝidino sur pizo
3. Novaj vestoj de la reĝo
4. Neĝa reĝino
5. Knabineto kun alumetoj
6. ktp...ktp...



/Ingegerd

Trezorkesto por la radianta lingvo

Ĉio en la vivo ne daŭras por ĉiam. La tempo ofte solvas ĉiujn problemojn.

La verkisto, H C Andersen priskribis pri tio en siaj fabeloj.

La fabelo "Malbela anasido" estas bona ekzemplo.

Ankaŭ la Biblio havas ideon pri tio en Sankta Mateo 20:16:

"Tiel la lastaj estos la unuaj, kaj la unuaj estos la lastaj" ...
nenio estas por ĉiam!

Fabeloj de H C Andersen, legu!

<https://eduinf.waw.pl/esp/lern/librejo/0014/index.php>



Pjotr Ĉajkovskij

– la sentema, rusa komponisto.



Pjotr Tjajkovskij naskiĝis la 7:an de majo, 1840 en Kamsko Votkinsk kaj mortis la 6:an de Novembro 1893, en Sankt Peterburgo.

En Votkinsk li vivis kun sia familio, la patro Ilja Petrovitj Tjajkovskij kaj la patrino Alexandra Andrejevna. El la sfero de ses gefratoj li estis la dua naskita filo.

Kaŭze de nova laboro de la patro, la familio moviĝis unue al Moskvo kaj plue al Sankt Peterburgo. En tiu urbo li komencis siajn jurajn studojn. Nur en la jaro 1862 li povis komenci en la nova konservatorio en Sankt Peterburgo.

Dum la jaro 1893 disvastiĝis la ĥolero kaj Pjotr trinkis akvon ne kuiritan kaj malsaniĝis en la terura malsano kaj mortis.

Sed, lia muziko vivas! /Ingegerd

”Cignolago” – drameca baletto



Dum la aŭtuno 1875 Pjotr Tjajkovskij komencis skribi la baletton ”Cignolago”. La baletto havis la plej unuan prezentadon en februaro 1877 en la Bolŝoj-teatro en Moskvo.

Estis grandega fiasko!

Sed jam en 1895 oni provis prezenti la baletton denove, nun en Sankt Peterburgo kaj je tiu fojo ”Cignolago” havis grandan sukceson.

La baletton oni prezentis ankaŭ iam en ”Stora Teatern” en Gotenburgo.

Ĉi tiun jaron, en 2018, estos la vico de ”Liseberg”. Estos glacibaletto kaj ĝi havos la unuan prezentadon la 16:an de Novembro.

Atente serĉu biletojn!

/Ingegerd

Memoroj de tre interesa studsezono en Karlskoga kun Lars Forsman kiel instruisto

de Siv, unu el la gelernantoj.



Foto de 2000. Starantaj de maldekstre: Tsuneko (el Japanio), Mona (el Sandviken), Helén (tiam loĝanta en Danio), mi (Gråbo), Anna (Pålsboda), Atiko (Japanio), Joanna (Ugando), nia instruisto Lars Forsman (Karlskoga).

Sidanta de maldekstre: Steven (Ugando), Saimir (Albanio), Dritan (Albanio), Erik (Filipstad), Sven (Danio) kaj Tom (Ugando).

Mona helpis min memori ĉies nomojn.

Unue iomete pri la kondiĉoj. Mi havis pagitan "liberan jaron". Mia labordonanto, AMI Karl Johan, ŝtata institucio, ŝanĝis la labormetodojn kaj trovis ke la dungitaro estas tro granda. Se iu volis forlasi sian dungon kun salajro dum unu jaro, eblus. Mi volis. Mi jam havis 17 jarojn en la sama laborejo. Venis unu el miaj plej interesaj jaroj, kaj duono de la tempo temis pri esperanto-studoj en la popola altlernejo de Karlskoga dum kvar monatoj en 2000.

Miaj plej belaj bildmemoroj de aŭtunaj monatoj devenas de la jaro 2000. Mi navetvojaĝis inter Gråbo kaj Karlskoga. Mi ne memoras ke iam pluvis dum la "navettagoj" lunde kaj vendrede. Kompreneble pluvis, eĉ multe, ĉar la surfaco de la lago Vänern pli kaj pli altiĝis, kaj mi timis ke la akvo baldaŭ atingu la vojon. De la vojo mi vere havis belan vidaĵon kaj mi aŭskultis multajn sonbendojn pri "La Faraono". Samtempe mi do estis en Svedio kaj Egiptio.

Mi memoras ke la lago trembrilis en la vendreda posttagmeza suno. La folioj ŝanĝis la kolorojn, sed ankoraŭ fiksiĝis sur la branĉoj, ĉar la vetero estis sufiĉe varma kaj ŝtormegoj preskaŭ ne estis.

Lunde mi startis frue, kiam estis sufiĉe malhele. Bestoj moviĝis ĉe aŭ sur la vojoj.

En Degerfors oni fakte vidis lupojn, sed mi ne. Foje mi bedaŭrinde havis proksiman kontakton kun alkoj.

Matenon granda alko krucis la vojon. Feliĉe ĝi savis sin, kaj ne estis trafita de la granda aŭto, kiu veturis antaŭ mi. Sed poste iu stranga malhela objekto flugis kontraŭ mi. La antaŭa aŭto abrupte bremsis kaj kun eta marginalo mi sukcesis elvojiĝi for de la fluganta objekto kaj for de la antaŭa aŭto. Mi haltis ĉe la vojflanko kaj iris malantaŭen por ekscii kio okazis.

Mi ja komprenis ke la fluganta objekto estas la alkido, kiu ne havis la saman bonŝancon kiel la alkino. Ĝi estis trafita kaj ĵetita al la

fenestro de la antaŭa aŭto, kaj poste ĝi estis fluganta preter min. Nun ĝi kuŝas sur la vojflanko.

La viro en la aŭto unue sidas tute nemova, rigardante la fenestron. La vitro restas tie, sed kun stela "desegnaĵo". Malantaŭ reto sidas du grandaj hundoj en la aŭto, tute trankvilaj. Post momento la viro "vekiĝas" kaj diras ke estas la unua tago, kiam li kondukas la novan aŭton. Mi vere bedaŭras lin.

Ni iras por rigardi la alkidon, kiu feliĉe estas morta. Kompreneble ni volas raporti al la polico, kio okazis. Sed kie ni estas? Distance ni vidas grupon de ruĝaj domoj. Post iu tempo biciklanta viro venas. Li informas ke ni estas proksime al Vara. La nomon de la vilaĝo mi forgesis. Li vespiris, dirante ke ni ne estas la unuaj kiuj renkontas krucantajn alkojn sur tiu distanco.

Malgraŭ tiu akcidento mi tamen estis en Karlskoga ĝustatempe por la unua leciono. Pluvon oni povas sperti diversmaniere en diversaj landoj. La tri junuloj de Ugando, kiu loĝis en la centro de Karlskoga, ne iris al la lernejo la unuajn pluvajn tagojn en oktobro. Lars Forsman per sia aŭto venigis ilin, antaŭ ol ili komprenis, ke pluvo en Svedio estas

eterna gutado, ne torenta pluvego kiel en Ugando.

Lars Forsman havas la talenton inspiri siajn gelernantojn. Por ni ankaŭ estis bone ke esperanto estis la nura lingvo en kiu ni povis paroli kun la japanoj, albanoj kaj ugandanoj. (Nu, la ugandanoj scipovis paroli la anglan).

Lars ankaŭ aranĝis lingvolaboratorion, kie ni povis mem ekzerci. Tre efike kaj novaĵo je tiu tempo.

Mi esperas ke ĉiu iam povu sperti similan interesan studsezonojn, kiun mi spertis en Karlskoga! Bedaŭrinde la internaciaj studsezonoj pri esperanto en Karlskoga ĉesis kiam Lars fariĝis pensiulo. Tamen ili dum 15 jaroj ekzistis donante al la gelernantoj globalan etoson.

Kiam vi legas ĉi tiun tekston estos novembro. Mi memoras ke en Karlskoga ni skribis poemojn pri niaj plej ŝatataj monatoj en esperanto. Nur du personoj – Erik kaj mi – elektis novembron. Ni ŝatas ĝin ĉar estas trankvila monato – post intenca oktobro kaj antaŭ la celebrego de la decembraj festotagoj.

Kiu estas via plej ŝatata monato, kaj kial?

Dubrovnik Aŭgusto 2018



Sunleviĝo super Malnova Urbo. Marrokoj kaj ŝeretoj naskiĝas el la nebuleto. La preĝejaj sonoriloj vokas la okan horon. Trankvilo kovras la mondon. La cikadoj ludas sian matenan kanton. La kafo kunprenita dehejme gustas pli ĝuinda ol kutime, kiam la preĝejaj

sonoriloj nombras la okan horon. De nia loĝejo alte surmonte ni ne vidas turistojn svarmantajn. Nia loĝejo situas super la urbo, 3000 ŝtupoj super la turistoj. Same kiel la diino Indra ni povas descendi al la mondo de la homoj por ilin viziti kaj ekkoni.

Malsupre en la urbo ni povas manĝi hejmefaritajn pasteĉojn kaj fromaĝojn en la mallarĝaj stratetoj inter la malnovaj domoj konstruitaj el sabloŝtonoj. Turistoj de multloke de la mondo vagadas ĉirkaŭ ni dum ni vespermanĝas. Antaŭ momento, kiam ni alvenis la strateto estis senhoma, sed dum

krepuskiĝas la gastoj alvenas por manĝi ĉe subĉielaj tabloj.

Kiam finiĝas la matenmanĝo sur nia verando, ni ekrigardas la multajn boatojn, kiuj malrapidas sur Adriatiko profunde sub ni malantaŭ la remparo de la Malnova Urbo. La ruĝaj tegolaj tegmentoj leviĝas super la blua maro. Preskaŭ ĉiuj tegmentoj estas novkonstruitaj post la lasta milito dum la 1990-aj jaroj. La urbo situas en la sama loko dum centoj da jaroj, la urbo, kiu rezistis atakojn kaj militojn, la urbo, kiu ankoraŭ portas truojn de pafoj en stratoj kaj muroj de la lasta milito. La malsaĝeco de ni homoj. Mi sidas kun Pär-Johan sur nia verando kaj bonvenigas nian unuan tagon.



Ni promenadas en la Malnova Urbo, en la miraklaj stratetoj plenaj de etaj manĝejoj kaj restoracioj. Ĉiuj stratetoj gvidas supren al la montoj, kiuj ĉirkaŭas la urbon. Kelkaj stratetoj verdire ne estas stratoj, sed ŝtuparoj. La verdaĵo en ĝardenetoj ombras la ŝtuparojn ie kaj tie. La ĉefstrato de la urbo iam estis larĝa kanalo. Dum la mezepoko oni plenigis ĝin per gruzo. Nun ĝi estas larĝa marmorstrato, kiu gvidas tra la tuta Malnova Urbo. Malnovaj palacoj konstruitaj el brila sabloŝtono enkadrigas la straton. La katedralo "Virgulino Maria" plenigas unu el la placoj, kiuj malfermiĝas inter la stratetoj. Mezepoka urboplanado! Multaj el la placoj estas plenaj de restoracioj, kiuj vendas tipe kroatan manĝaĵon kaj vinon. Ĉio donas senton de alispeca mondo, mondo vekita de pratempo, mondo kiu vivas en alia rapideco. Mirinde, ke dum kelkaj tagoj viziti alian,

malrapidan mondon kun paroloj kun mia filo pri diversaj temoj dum malrapidaj manĝadoj kaj bongusta nekutima manĝaĵo, manĝo de la maro, fromaĝoj, ŝafidaĵo. Inter la remparo de la urbo svarmas multaj turistoj, sed sur nia veranda super la tegmentoj de la urbo regas la trankvilo. La muroj kaj la pordoj portas belajn dekoraciojn. Dankon ke tiu ĉi bela memoro de la mezepoko ne detruigis dum la balkana milito en la 1990-aj jaroj. Dankon ke la urbo ricevis helpon revekigi!



Denove aŭdeblas la preĝejoj sonoriloj ĝis nia verando. La kvina horo.

La stratetoj en la montaj kvartaloj, kie ni loĝas estas tiel mallarĝaj, ke la aŭtoj ne povas turniĝi. Ili devas retroveturi por povi eliri la strateton aŭ parkejon. Blankaj boatoj sur la blua maro.

Nova ĝuinda mateno super la mezepoka urbo kaj la Mediteraneo. Ni manĝis, parolis, sendis mesaĝojn, ekzercis stari sur unu piedo. Tia estas nia "nova mondo", pri kiu Pär-Johan kelkfoje sopire parolas. La preĝejoj sonoriloj nombras la matenajn horojn. La vivo ne tro stresa, sed plena de pensoj kaj interesaj diskutoj. Shangri-La, kie ĉiuj kunlaboras. Bela travivaĵo! La matena lumo ludas super la ruĝaj tegolaj tegmentoj kaj helaj muroj de la domoj. Ni komencas la tagon per promonado de niaj montoj tra la krutaj stratetoj, malsupren al la urbo, la fortikaĵo, la maro, la haveno. Kiom da cent miloj da homoj vivis tie ĉi en milito, en batalo, en paco, en bonfarto! Tiu urbo iam estis inter la plej potencaj urboj en tiu ĉi parto de la Mediteraneo. Ni trovis ombran lokon en la haveno, kiun ni vidas de

nia verando. Multaj etaj boatoj kaj pli grandaj turismaj boatoj. La domoj grimpas supren laŭ la montoj. Ni vidas nian verandon tre, tre alte.

Sur unu placo oni nutras la kolombojn de la urbo tagmeze. Ĉiuj kolomboj kolektiĝis sur la tegmento de la palaco. Ili flugis tien reen kaj kvazaŭ atendis. Bela teatra ludo. La sonorilo batis dekdu batojn. Miloj, miloj de kolomboj ekflugis al la grundo en la sama momento. Fariĝis granda festo. Ili staris surdorse kaj surkape unu de la alia. Granda festo, kiu ripetiĝis ĉiun tagon.

Virinoj pasumis en longaj roboj kaj grandaj ĉapeloj aŭ en ŝortoj kaj T-ĉemizoj. En la haveno estas varme, sed tamen agrable kaj iom da ombro. Somero. Silente. La homoj promenas kiel en filmo, kiu ludas antaŭ ni. Ni pasumas laŭ la kajoj, sidas sur benkoj en la ombro, spektas la homojn kaj boatojn, kiuj foriras de la haveno. Pär-Johan naĝis en la Mediteraneo, sed revenis kaj diris, ke estas malvarme. Post la bano ni trovis terason sub grandaj arboj, kiuj donis ombbron al manĝejo. Mirinda elrigardo super la maro. Ni ripozis tie, manĝis kroatajn fromaĝojn kaj trinkis glason da vino. Ni devis kolekti fortojn por grimpi niajn 3000 ŝtupojn hejmen. Ni diris bonan nokton al Dubrovnik, dum la krepusko falas super urbo kaj maro.



Ni tre deziris viziti la najbaran landon Montenegro. Ĝi ne apartenas al EU. Tial la limo inter tiuj du landoj fariĝis "grava limo" aŭ "ekstera limo" de EU. Ni devis longe atendi por trapasi la limon. La trafiko en la flanko de Montenegro estis tre abunda. Tio

signifis, ke la vicoj estis tre longaj. La domoj je tiu ĉi flanko de la limo estis nerenovigitaj, iom kadukaj, similis al la "malnovaj tempoj". Tute ne similis al la "bela lando", kiun promesis Pär-Johan. Ni malrapide avancis. Post duonhora veturado ni alvenis al pramhaveno. Ni decidis ĉirkaŭveturi la fjordon kaj ne uzi la pramŝipon. Ĉio ĉirkaŭ ni mirakle ŝanĝiĝis. La trafiko fluis glate. Laŭ la vojo aperis belaj domoj, kelkaj tre luksaj. Laŭ la alia flanko de la fjordo leviĝis belaj montoj. Fabela lando montriĝis, tute alia ol la unuaj kilometroj de Montenegro. Ni ĝuis nian fabelan landon ĝis ni alvenis al fabela urbo, Kotor. Ĝi naskiĝis antaŭ 2000 jaroj aŭ pli, en praa tempo. Dum la jarcentoj okazis militoj, la lando apartenis al diversaj regnoj, la otomana regno, la bizantina regno, la serba regno. Ŝildo de palaco, kiun ni pasis rakontis al ni, ke iam la palaco apartenis al bizanta familio. La malnova urbo de Kotor estis tre bone renovigita, ĉirkaŭita per remparo. Ni promenis surrempare ĉirkaŭ la urbo. La enspezoj de turistoj vivtenas la urbon, kiu estis plena de agrablaj restoracioj en la malnovaj palacoj. Ekzistis multaj teatroj kaj muzikprogramoj. Ĉio tio pli bone ol militoj kaj detruoj!

Survoje al la limtrairejo ni haltis ĉe la strando por ĝui la belan vidindaĵon kaj gustumi glaciaĵon. La vojoj estas tre mallarĝaj kaj malfacilas parki la aŭton. Mi nun donas la "skribilon" al Pär-Johan por rakonti pri la veraj okazintaĵoj de la resto de la tago.

What a day, wonderful and awful, oddly mixed together in a strange package.

– 1 hour to cross the border into Montenegro.

– Flat tire on the way back, had to change it in 35 degrees heat.

– Changing tire made my blood sugar sensor to come out, only 90 minutes after I put it in.

– Mum lost her sunglasses somewhere.

– 2 hours to cross back into Croatia. 100 minutes to drive just 2 km!!! 🤪

– All this made us not having any time at all

to have dinner.

– Just when we entered the new part of Dubrovnik, to drive the rental car back, our GPS lost its signal, so I had to find my own way.

– Arriving back at 8.58pm, meeting such an angry person, even though in the confirmation email it states that they are open until 9pm (plus I spoke about that with another person there when we picked up the car).

La venonta mateno estis trankvila post la enhavoplena antaŭa tago. La temperaturo altas, la aero estas senmova. Ŝajnis pli varme ol dum antaŭaj tagoj. Ni volis trovi lokojn kun iom da ombro. Ni trovis la plej bonan glaciaĵojn, sed tie ili ne volis akcepti kreditkarton. Ni nun finfine trovis "cash" kaj povis manĝi nian bongustan glaciaĵon. Sed la suno ĉasis nin eĉ en la mallarĝa strateto. Ni devis trovi novan protektejon kontraŭ la 35 gradoj C. Sed eĉ ne la preĝejoj "benis" nin. Ni vizitis unu katolikanpreĝejon kaj unu ortodoksan preĝejon. Ili estis riĉe dekoritaj, ĉiu laŭ siaj tradicio kaj reguloj, kun ora ikonostazo, sed neniu el la preĝejoj donis al ni refreŝigon. Ni provis viziti Mammon, sed ankaŭ la bankoj ne favoris nin. Ili havis problemojn interŝanĝi monon.



Finfine ni trovis lokon, kiu logis nin "ombro ĉe la maro", sed ankaŭ tio ne sukcesis. Ni iris al "nia plej bona loko", al teraso ĝuste ekster la remparo kun ombrodonaj arboj kaj kun mirinda elrigardo super la maro, la haveno kaj la urbo. Ni denove manĝis kvar bongustajn fromaĝojn kaj trinkis glason da

vino. Tamen estis sufiĉe varme rampi al "nia domo". Pli poste en la vespero ni grimpis eĉ pli alten por vidi la krepuskon fali super "nia eta mondo". Kiam estis tute malhele ni vidis imponajn piroteknikaĵojn super la maro. Post la enhavoriĉa tago ni bone dormis en nia domo kun klimatizado.

Lunde matene! La lasta tago! Matena lumo super la maro. La lumo ŝanceliĝas super la maro kaj la urbo. Pär-Johan ne sentas sin bone hodiaŭ. Mi sidas surverande legante.

Vespere ni promenas malsupren al la urbo, vagadas sur la placoj kaj sur la granda marmorstrato, kiu iam estis kanalo. Kandeloj kaj lanternoj eklumas, la vesperaj turistoj alvenas. Ni ĉirkaŭpromenas kaj revenas al nia plej ŝatata loko "la teraso" kun elvidoj super la haveno. Mi manĝis oktopuson. La manĝaĵo en Dubrovnik estas bongusta, multe da bongustaĵoj de la maro, fromaĝo, vino, ŝinko kaj kompreneble la glaciaĵo. En la haveno moviĝas multaj specoj de boatoj, ni vidas la remparon, la preĝejajn turojn, la horloĝajn turojn, la fortikaĵon. La krepusko falas ĉirkaŭ ni, dolĉa muziko, la "urbaj gardistoj" marŝas kaj haltas ĉe la urbopordegoj por "gardi". Ili portas mezepokajn kostumojn. Ni reiras al nia loĝejo kun la animoj plenaj de nostalgio kaj dankemo pro nia mirinda semajno en Dubrovnik. Ĉiuj diverskoloraj katoj, kiuj kutimas akompani nin en nia longa deklivo, nun diras al ni "bonan nokton" aŭ eble "ĝis revido". Nun ili ĉiuj loĝas en la fotilo de Pär-Johan.

Marde. Ni pakas kaj veturas per taksio al la flughaveno kun la najbaro de la gastiganto. La lasta vojaĝo inter la belaj montoj. Atendo en la flughaveno! Kontroloj en la flughaveno! Kiom da terorismo oni malhelpas per la multaj kontroloj?

Finfine ni sidas en la aviadilo de Dubrovnik al Pula en norda Kroatio, kie ni "haltos", sed ni ne ŝanĝos aviadilon. Bedaŭrinde ni devas eliri la aviadilon *kun* niaj valizoj kaj porti ilin

malsupren, supren laŭ ŝtuparoj. Lifto ne ekzistas. Ni devas denove trapasi multajn "sekurkontrolojn kaj pasportkontrolojn". Oni devas rapidi ĉar ni devas vicestari kaj iri laŭ ĉiuj kontroloj kaj ŝtuparoj kaj denove sidi en la sama aviadilo. La aviadilo forflugas al Amsterdamo duonhoron post la alveno.

Ankaŭ tie ni devas eliri la aviadilon, sed nun en pli facila maniero. Niaj sidlokoj estis en la plej lasta vico. Bela vespero alte super la nuboj. La nuboj montris belajn "regionojn". Kampo kun neĝo degelanta, montopintoj, marĉo kun mola erioforo. Pär-Johan mendis manĝon por nia "lasta vojaĝo". Mi manĝis kokidsalaton, tre bongustan. Pär-Johan manĝis salmosalaton kun krenosaŭco. Li ne ŝatis ĝin, estis tro forta. Li diris tion al la kelnerino, kiam ŝi demandis, ĉu ni ŝatis la

manĝon. Tiam li ricevis ankaŭ kokidsalaton kaj bone satiĝis.

Ni surteriĝis en Arlanda, Stokholmo. Pär-Johan havas du biletojn por Arlanda Express. Estas tre lukse vojaĝi per ĝi. Sed oni devas rapide ĝui, ĉar la vojaĝo daŭras nur 20 minutojn kaj oni rapidas je 180 km/hore. De Stokholmo ni vojaĝas pli modeste. Unue ni maltrafis lokan trajnon, poste buson al Brandbergen ni maltrafis. Tie ni atingis je la dekunua horo vespere, ni eniris la apartamenton kvaronon poste.

Kvaronon pli poste persono estis murdita kaj alia persono grave vundita en Brandbergen Centrum, kie ni ĵus pasis.

Kerstin Rohdin kaj Pär-Johan 2018

Silenta minuto 11 novembro je 11 horo

De Kaarlo Voionmaa ni ricevis memorigon, ke la 11 novembro estos la memortago de la fino de la unua mondmilito. En Francio kaj multaj aliaj landoj oni honoras la memoron per silenta minuto je la 11a horo en tiu tago. Esperanto estas la lingvo por paco kaj kompreneble ni subtenas la iniciaton kaj volas partopreni en la minuto.

Kaarlo skribas (tradukite): En Finnlando oni havas memormomentoĵojn ĉi-jare ankaŭ pro tio, ke pasis 100 jaroj de la fino de la interna milito. En tiu milito mortis pli ol 30 000 homoj, inkluzive tiuj, kiuj mortis en la kampadejoj konstruitaj por la ruĝaflankaj militintoj. Tiuj kampadejoj estis la unuaj koncentrejoj en Eŭropo. Ni ne rememoras



tiun militon pro malbonvolo aŭ por daŭrigi la malamon, sed ĉar ni volas montri nian volon evoluigi nian socion eĉ pli humane.

Ni ne devas forgesi nian historion. Ni devas trovi tiujn aferojn, kiuj

proksimigas nin reciproke. Nun ni kreas novan mondon baze de paco kaj de la fundamenta valoro de ĉiu homo. Esperanto konvenas al tiu celo treege bone. Ĝi helpas al komunikado trans la naciaj kaj lingvaj limoj. Ja komunikado estas unu el la plej gravaj aspektoj de la konstruado de paco.

Kaarlo finas en esperanto: Mi esperas ke la supra finna skribaĵo helpos vin realigi la ideon de komuna eŭropa memortago honore al la fin(ig)o de la homa buĉado kiun ni kutime nomas la unua mondmilito.